

# LEAG - INFORMILO

(MAGAZINO)

Organ des Freien Esperanto-Bundes in deutschsprachigen Gebieten

Libera (Laborista) Esperanto-Asocio en germanlingvaj regionoj

Enhavante paĝojn de *La Socialisto*, organo de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista

Fondita (gegründet) 1956

Eldono nro.6

2-a jarkvarono 2004



*Egal' kio okazos en la vivo...*

*Ĉiam estu gaja (kiam eblas ? !), ankaŭ tiam, kiam nia kasrespondeculo devas 'proklami', ke nia asocia kaso montras - preskaŭ - malplenen. Bonvolu legi la raporton sur paĝo 2.*

*Malplena kaso signifas, ke ni devas ŝpareme mastrumi ĉi tiun 'iometon' bone konsidere al la garantio de la eldono de nia revuo - LEAG-Informilo - ĝis minimume - ni atingos la jaron 2006.*

*En 2006 ni povos soleni la jubileon de nia asocio, ĝi tiam atingos la aĝon 50 !*

*Ĉu ni povos esperi, ke tiam nia kaso permesos eldoni memorigan publikaĵon?*

*Jiri kaj Albert*

*El la preparejo de la Informilo...*

Ni jam komencis ŝpari. La titolo de la revuo ne plu aperos en verda koloro. Ĝi forglutas multe da mono, ĉar ni mem interpretis ĝin, kio kostas preskaŭ ĉiam kolorkartoĉon (25,99 €). Fari tion en kopiejo estas pli multekoste ol private.

La nombro de l'paĝoj verŝajne devos esti reduktataj. Tiam - bedaŭrinde - ne ĉiun tekston ni povos uzi. Kompreneble, nia frata organizo ASLE plue povos disponi pri du paĝoj!

Kiam iam la situacio pliboniĝos, la asocio revenos al la ĝisnuna eldonmetodo.

La redakcio

La lasta ĉapitro

En julio dek dua de dumil tri  
rondiris la globon la jena kri' :  
Aero-polico sendos bomb-aviadilaron  
por finpereigi la tutan homaron !

La mondregistaro decidis direkti',  
(laŭ ĝi jam ne eblis alie elekti)  
"por krei pacon, nepras tre taŭga plano  
por venenado de ĉiu mondano."

"Ne fuĝu", estroj plue dekretas,  
ĉar kien vi vin forsekretas,  
kaŝejen ŝvebos gas'venena,  
neniu restos vivoplena!"

En julio dektrian ekis flugeskadrono,  
forlasis flug-kampon de urbo Bostono  
en plej grava lando nomta USONO  
plenumi mision por "tutmonda bono".

Da aviadiloj miloj kaj miloj  
ŝarĝitaj per gaso kaj ankaŭ baciloj  
rapidis tutgloben laŭ ordo registara  
dissemi morton tra mondo somara.

Plorĝene oni kaŭris sub litoj kaj tabloj  
sidis kele, arbare, subtere, sub stabloj  
flavnube veneno aeron trapuŝis  
kadavroj asfaltan milope surkuŝis.

Eskapi la morton jen ĉies ideo,  
sed vana estis ĉiu veo:  
gaso ŝtelire sur dezertoj kaj maroj,  
kadavro-faskoj sur urb-trotuaroj...

aperis kiel putraj garboj,  
kaj birdoj falis el la arboj.  
En bestoĝardeno simila sorto :  
teruraj krioj antaŭ la morto.

Estingiĝis la fajroj kiuj iam helis,  
senstiristaj ŝipoj velis  
sur oceano sen ajna celo  
dum aviadiloj falis el flava ĉielo.

Perfektan staton ? La homoj ja planis !  
Malperfektaj metodoj ne multe humanis  
pacajn elipsojn pluplenumis la tero,  
ĝin ja ne koncernis la tuta afero.

*La tradukistino Helga Rapley trovis la poemon de Erich Kästner, verkita en 1930 hazarde. Frapis ŝin mencio pri gaso k baciloj kaj la sidejo de la mondregistaro en USONO!*

*(Aperis en 'LAUTE' 1.kv.2003)*

**Eldonanto - Herausgeber**

**Libera (laborista) Esperanto-Asocio  
en germanlingvaj regionoj (LEA/G)**

**Freier Arbeitnehmer-Esperanto-Bund  
in deutschsprachigen Gebieten**

**Sekretario: Jiri PROSKOVEC**

**Heimbastr.10, (DE)44143 Dortmund**

**Tel: 0231/551211 ePost: Proskovec@yahoo.de**

**LEA/G-Konto: PROSKOVEC, Jiri, 4907 664 100**

**Norisbank Dortmund (BLZ 760 260 00)**

**Respondeculo LEA/G-Infomilo: A.F.STEPHAN,  
Renchener Str.47 (DE)77704 Oberkirch (Baden)**

**Tel/Fax: 07802 - 90336**

**(Fakso nur eblas post antaŭanonco!)**

**Kunlaborantoj: K.H.Kersting, Essen**

**Hans Rodewig, Hannover (H.R.)**

**Redaktas la interretan MAGAZINon:**

**Gary MICKLE, Brüsseler Str.6 (DE)13353 Berlin**

**GMICKLE@NEXGO.DE**

**LEA/G-Infomilo aperas en ĉiu jarkvarono, se eblas**

**Abono: per donaco de 10 Euro**

**Membreco/Mitgliedschaft en LEA/G: 8 Euro**

**jareljährlich (inkludas liveradon/Lieferung de la  
Infomilo kaj aliaj servoj/andere Dienste.**

**Ligata: Aŭstria Socialista Ligo Esperantista, Vieno**

**Organo: La Socialisto Resp.: Reinhold Kammler**

**Karl-Beck-Gasse 3/2 A-1220 Wien**

**Pri la enhavo de sia teksto respondecas la verkisto**

**mem. La redakcio havas la rajton, mallongigi**

**tekstojn kiam mankas spaco, aŭkaj ne akcepti ilin.**

**Esperanto-Buchversand**

**Dr. Wolfgang Schwanzer**

**Pfarrer-Seeger-Str.9 DE-55129 Mainz**

**Fon/Fax (vespere) 06136/46232**

**[www.esperanto-buchversand.de](http://www.esperanto-buchversand.de)**

**[wolfgang.schwanzel@esperanto.de](mailto:wolfgang.schwanzel@esperanto.de)**

La librolisto 'Neue Bücher' (Novaj Libroj) enhavas informojn pri pli ol 35 libroj. Telefone, fakse, per interreto vi povas mendi la liston.

\*\*\*

LEA/G rekomendas ankaŭ la SAT-libroservon. Listo havebla ĉe: S A T, 67, av. Gambetta, FR-75020 Paris  
Tel.: 00.1.33.47.97.87.05 Rete: satesper@n oos.fr

\*\*\*

**ESPERANTO sennacieca lingvo**

**Monĝiro interne Eŭropo...**

*ne kostas tiel multe kiel regule. Oni bezonas por tia ĝiro kodojn ekz. por via pago al la kaso de LEA/G - Jiri Proskovec, Dortmund, Kto. 4907 664 100 Norisbank, Dortmund (BLZ 760 200 00) vi devas krome menci*

*IBAN (International Bank Account Number) =*

*DE26 7602 6000 4907 6641 00*

*BIC (de la Norisbank) = NORSD333*

*J.Pr*

**LEA/G dankas por la donacoj de...**

Brauser .....	7 €	Retzlaff.....	2 €
Bues .....	12 €	Rodewig .....	12 €
Conzeth, Helga .....	12 €	Scherm .....	2 €
Dörr .....	2 €	Schwanzer .....	2 €
Ehlers .....	9 €	Stephan (por info 4)45€	
Haupt .....	2 €		
Hocke .....	92 €	(en la eldono nro.7 pluajn donacojn, kiam estas.)	
Knöferl .....	2 €		
Paech .....	12 €		

**Financraporto por la jaro 2003 (€)****Enspezoj**

Havaĵo el 2002.....	104,40
Kotizoj kaj donacoj .....	342,--
Pago por kolorinkujo por la presilo .....	19,39

Entute: ..... 465,79  
=====

**Elspezoj**

Kontokostoj 1 - 3 kv. ....	17,70
Administrataj elspezoj .....	14,59
A-kto. al Infomilo-redakcio * .....	300,--
Donaco al Hüser-Instituto pro jubileo .....	20,--
Kotizo al LEA-Komitato de SAT .....	15,--

Entute: ..... 367,29  
=====

**Havaĵo 01.01.04 .....** **98,50**

Dortmund, 01.02.2004

Jiri Proskovec  
Sekretario

Revizoroj: Hans Jankowski, Dortmund, kaj,  
K.H.Kersting, Essen

\* Detaloj paĝo 3

Detaloj – financraporto 2003 (€)

2004 la jaro de la virinoj!

La LEA/G-Infomilo kaŭzis jenajn elspezojn:

01.01.03 LEA/G-kaso ŝuldas al redakcio -	9,56 ./.
INFO 1 kostis (fotokopioj k. afranko) -	63,48 ./.
aliaj elspezoj	15,54 ./.
El la LEA/G-kaso	300,--
kotizo de Stephan	8,--

En la redakcia kaso je la 01.03.03 219,42

INFO 2 kostis (fotokopioj k. afranko)* -	151,76./.
aliaj elspezoj	28,35./.

En la redancia kaso restis je 01.07.03	39,31
Pagis kotizon Stella de Werth	20,--
En la kaso, do,	59,31

INFO 3 (por fotokopioj k. afranko)	143,70./.
aliaj elspezoj	6,14./.
el la asocia kaso	100,--

Restas en la redakcia kaso	9,47
	====

\* Ek de INFO nro.2 la kostoj altigis ĉar formato kaj volumo plimultigis. Dependis de la 2 paĝoj por ASLE kaj ekspedoj al ASLE-legantoj. Nia aŭstria fratorganizo pagis sian parton komence de 2004.

La elspezoj por INFO 4 (2003) aperos en 2004.

Por la INFO-redakcio: A.F. Stephan


\*\*\*

Amikeco per letero serĉas...

Inez GANE, 95, Ave. IBN SINA – Abderrahim (Marokko)

ROK-GAZET' – tre ĉarmaj eldonoj, pli ol 40 paĝoj, paĝoj 1,2 k. la lastaj en koloro, enhavo tre legebla, ion por ĉiu parolanto de Esperanto. 3 numeroj 16 € Mendebila ĉe:  
ROK-gazet', (Esperanto-Muzik-Magazino)  
FR-31450 Donneville [www.rokgazet.free.fr](http://www.rokgazet.free.fr)  
[www.vinilkosmo.com](http://www.vinilkosmo.com)

La redakcio ĉiam volonte akceptas tekstojn, bildojn, karikaturojn, kiuj ne estu koloraj, ĉu mem skribitaj, mem faritaj, por la informilo. Kompreneble, ke tia materialo estu laŭsence de nia laborista esperantismo



Kion la virinoj deziras, ke la edzo/partnero estu...

- 1: Demandon pri la farto ĉiun tagon. Kiam li ne demandas, la edzino dubas pri lia amo al ŝi.
2. La edzo estu rev-viro, honesta kaj fidela. Li helpu en la dommastrado. La edzino ŝatas, ke li tralavas la vazaron kelkfoje aŭ minimume sekigas ĝin.
3. Viroj ne tiel multe babilas kiel virinoj, sed estus ne pardonebla kiam la edzo sidas silente en restoracio dum manĝado dum kandeloj lumas.
4. La edzo surprizu sian karan edzinon de tempo al tempo per florbukedoj. Sufiĉas jam floroj el la superbazaro. Li povas ankaŭ atesti sian amon per biletoj al koncerto, teatro k.a. Virinoj ĉiam tre ŝatas etajn surprizojn.

\*\*\*

59a Kongreso de SAT-AMIKARO  
11an – 14an de aprilo 2004  
en – FR-85021 LA ROCHE SUR YON  
Lycée Pierre Mendés France  
Boulevard Arago

Aliĝilo havebla ĉe: Esperanto-Vendée  
Le Grand Renaudon – FR-85540 Moutiers les Mauxfaits  
Tel/faksilo: (33 (0)2 51 31 48 50  
Retadrs.: [espero.hm@club-internet.fr](mailto:espero.hm@club-internet.fr)  
TTT-ejo: [www.esperanto-sat.info.sekcio.Vendeo](http://www.esperanto-sat.info.sekcio.Vendeo)

## Fritz-Hüser-Instituto

La instituto aperigis *Festschrift*, tekston pri la aktiveco de la gvidanto de la instuto, Profesoro Dro. Rainer Noltenius, okaze de sia eksigo pro atingo de la pensi-aĝo. Aperis i.a. artikolo pri la laborista Esperanto-movado antaŭ la hitlera tempo kaj en la eksa GDR de Detlev Blanke, Berlin. Li akcentis la kontinuan de la laborista esperantismo post la milito sed tute ne menciis, ke ja en okcidenta Germanio ek 1956 laboristaj esperantistoj fondis per LEA/G laboristan movadon laŭsence de la antaŭmilita laborista Esperanto-movado.

LEA/G subtenas ek de la menciita dato S.A.T. Komprenoble tio ne estis ebla en la komunista GDR, ĉar malpermesata. Tamen SAT kaj LEA/G-anoj zorgis, ke la esperantistoj en GDR ricevis Esperanto-gazetojn. Tion *kontrabandi* tra la gardemaj GDR-policistoj ne estis facila! Mi nur menciis unu kamaradon: Arthur Bolle, Berlin.

Mi tre bedaŭras, ke Hüser ne demandis ekzemple Jiri Proskovec, Dortmund, prizorgi artikolon pri la laborista Esperanto-movado en la okcidenta Germanio.

Cetere: LEA/G monsubtenis la solenan feston por Noltenius.

A.F.Stephan

(Kiu de vi, karaj legantoj, interesas la tekston de Blanke bv. mendi ĝin ĉe la redakcio.)

\*\*\*

## 12-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo...

okazos 2-9-/10.2004 en Salou (Tarragona)  
Katalunjo/Hispanio. *La Mekko de la Turismo*

Kongresejo k. tranoktejo: Hotelo SAN FRANCISCO \*\*\*,  
str.Amposta 5. – 150 metroj de la strando

Detaloj k. aliĝilo havebla ĉe: Luis Serrano Pérez  
Apartat 423, ES-08200 Sabadell - Tel: (+34) 93 727 50 21  
Retadrs: [luis\\_serrano@mixmail.com](mailto:luis_serrano@mixmail.com)  
Faksilo: (+34) 93 731 41 11 – *ne dum aŭgusto*  
<http://www.terra.es/personal5/1serrano/2003>  
*Korespondado prefere per la reto!*

\*\*\*

### Advokata kalkulo

Kun granda indigno s.ro Dupont enkuris en la oficejon de advokato kaj ekkriis:

- Vi sendis al mi kalkulon pri du konsultoj la sepan de julio, sed tiutage mi estis ĉe vi nur unufoje.
- La sepan de julio? – respondas la advokato trankvile. – Jes, mi nun memoras, estis mardo kaj forte pluvis, ĉu ne? Vi vizitis min dufoje.
- Ĉu vere? - demandas Dupont.
- Yes. Vi tiam revenis por preni vian pluv-ombrelon, kiun vi forgesis ĉi tie? (el: *Litova Stelo* 2/2003)

## Ni ricevis...

SLEA INFORMILO febr.2004

Berlina Informilo 2/2004

ANTAŬEN – Revuo de la Avileza Esperanto-Grupo

*MALLONGE* - Infoj de Lucine Giloteaux, Croix

LITOVA STELO, (2/2003) Revuo de Litova Esperanto-Asocio, Kaunas

LA VERDA PROLETO – Organo de SATEB, (1/04)

TREFO – Bulteno de TRENHA nro.10/2003

*SENNACIULO* – Organo de S A T

*La SAGO* – SAT-Amikara Gazebo, (10/2003)

MIKROFONE – Esperanto-Sekcio, Radio Pekino

*materialon por la informilo de: K.H.Kersting, Essen; Hans Jankowski, Dortmund; Manfred Retzlaff, Oelde; leteron de UEA, Willy Ehlers, Berlin; AVILA E-grupo k.a.*

\*\*\*



La laborgrupo de la Esperanto-sekcio de la Ĉina Radio Internacia en Pekino

*Oni povas kontakti kun la grupo, se partoprenante la UEA-kongreson en Pekino.*

\*\*\*

## 77-SAT-Kongreso Bratislava (SK) 2004-08-14/21

OKK:

Petro Chrdle, Zdenek Pluhar, Jana Melicharkova,  
Jarmila Rechterysova

Organizas: KAVA-PECH k. Esperanto-Societo  
Bratislava

Adrs.: KAVA PECH, Anglicka 878  
CZ-25229 Dobrichovice

TEL: +420 257 712 201 fakso: +420 257 712 126  
rete: [info@kava-pech.cz](mailto:info@kava-pech.cz); <http://www.kava.pech.cz>.

*Detaloj vi povas legi en la SAT-organo  
SENNACIULO*

### Antaŭrintempo

Suspiras nokte la degel'  
timiga estas tio ĉi.  
Trankvile estas ĉie, el  
la dorm' vekigis mi.

Rompiĝas de l'glaci rempar  
sur la akvejoj ĉie ĉi  
kunmortas kvazaŭ ankaŭ mi  
kaj reviviĝas el glaci'  
kaj fluas al la mar.

Ripozas ĉie en silent'.  
Nur jen kaj jen en iu dom'  
vekiĝas, ploras, ridas hom'  
laŭ la degela vent'.

*(Verkita de la poeto Kristian Matenstelo  
Christian Morgenstern, 1871 – 1914  
Esperantigita de Manfredo Ratislavo  
de la 17-a ĝis la 23-a de februaro 2003  
laŭ la origina germanlingva teksto.)*

**MALLONGE** (de L. Giloteaux, Croix) informas :

#### Aktivaj kolektantoj

En diversaj landoj esperantistaj filatelistoj partoprenas en ekspozicioj pri fakaj aŭ ĝeneralaj kolektoj de poŝtmarkoj, ekzemple en Valencia (Hispanio), Virton (Belgio), Birstein (Germanio).

*(Ind. de l'edakcio: INFOJ pri pm havebla ĉe Rolf BEAU,  
Eisserkirchweg 18, (DE) 27333 Schweringen)*

#### Vigla debato

Antaŭ ne longe dum Esperanto-renkontiĝo en Morbecque (FR) interesatoj elektis kaj ofte respondis al aktualaj demandoj, i.a. :

Kial vi estas esperantisto? Viaj spertoj, (mal)agrablaĵoj.

Ĉu vi vojaĝis per Esperanto?

Ĉu Esperanto iel ŝanĝis vian vivon?

Kiujn gazetojn, librojn, kongresojn, staĝeojn vi preferas?

Kio plej allogas vin en Esperanto?

*(Gvidis la renkontiĝon en nov. 2003 – P. Vilain)*

#### Teatro 'Espero'

Verkis Jean Amoureux mallongan biografion pri la gvidantino de la teatro : Zofia Banet-Fomalowa

### Vorfrühling

Vorfrühling seufzt in weisser Nacht,  
dass mir das Herze brechen will,  
die Lande ruhn so menschenstill,  
nur ich bin aufgewacht.

Oh. horch, nun bricht des Eises Wall  
auf allen Strömen, alle Seen;  
mir ist, ich müsste mit vergehn  
und, Woge, wieder auferstehn  
zu neuem Klippenfall.

Die Lande ruhn so menschenstill;  
nur hier und dort ist wer erwacht,  
und seine Seele weint und lacht,  
wie es der Tauwind will.

*(Originala germanlingva teksto de  
Christian Morgenstern, 1871 – 1914)*



### SAT en Britio invitas vin...

14-16 majo 2004 al la renkontiĝo en Barlaston vilaĝo, kie Krišimir Barkovic, la Ĝenerala Sekretario de SAT estos la gastpreleganto. Li gajnis la OSIEK-Premion 2002 pro sia traduko de '7000 Tagoj en Siberio' – la temo de unu el liaj du prelegoj. Por pli bone povi partcipi la diskuton bv. legi antaŭe la libron; havebla ĉe la SAT-centro en Parizo.

Por pluaj detaloj kaj la aliĝilo kontaktu :-

Wedgwood Memorial College  
Barlaston, Stoke on Trent  
Staffs. ST12 9DG  
Tel: 01782-372-105/01782-373-4278

Paralele okazos Esperanto-Konversacia Grupo por komencantoj *(kondukita en la angla)*

Anne Johnson, 42 Beresford Road, London N5 2HZ  
rete: [a.johnson@amsolve.net](mailto:a.johnson@amsolve.net) (ankaŭ)  
Ron Lynn rete: [ronsnafulin@aol.com](mailto:ronsnafulin@aol.com)

\*\*\*

Paĝoj de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista (ASLE)  
Seiten der Österreichischen Sozialistischen Esperanto-Liga

## La Socialisto

Edmond Privat

### La historio de la lingvo Esperanto

Literaturo Anstataŭ publikigi vastan plenan vortaron, d-ro Zamenhof aperigis en 1887 nur minimuman kelkcenton da radikoj kune kun la dek ses-regula gramatiko. Li fidis la vivon por alporti ĉion plian, sed tiun vivon li ne blinde atendis el ekstere. Eĉ tiun minimumon li ne prezentis tute sekan, sed jam kun interna vivo. Tio estas tre rimarkinda. Efektive la lingva sistemo estis jam preta multajn jarojn antaŭ eliro al publiko. Intertempe Zamenhof ekzercis mem uzi ĝin, pensi en ĝi, verki en ĝi, pacience kaj ame 'ĝis la paroŝo fluis'. Kiam presigis la Unua Libro, la aŭtoro estis trapasinta longan epokon de sufero kaj doloraj sentoj kaj tion li jam esprimis per verkaĵoj en sia lingvo.

Ĉiu esperantisto bone konas tiajn poemojn, kia estas 'Mia Penso':

Fajron sentas mi interne,  
Vivi ankaŭ mi deziras,  
Io pelas min eteme,  
Se mi al gajuloj iras...  
Se ne plaĉas al la sorto  
Mia peno kaj laboro,  
Venu tuj al mi la morto  
En espero – sen doloro !

Verkita per tre malriĉa radikaro ili tamen trafe esprimas apartan animstaton kaj komunikas al la leganto la vibradon de homa koro, sentema kaj soleca. La batadon de tiu koro aŭdigas eĉ pli forte la alia fama versaĵo :

Ho mia kor', ne batu maltrankvile  
El mia brusto nun ne saltu for !

Certe neniu aĉetanto de la unua lernolibro esperis, ke mondlingvo celus antaŭ ĉio literaturon, tute male.

Tamen, kiuj lernis la proponitan sistemon ĝoje ektrovis kelkajn modelojn de lingva uzo malpli

sekajn ol la simplaj frazoj de la ekzercaro : 'Rajdi sur leono estas danĝere. Infano ne estas matura homo.'



Baldaŭ ili konstatis – eble mire – ke esprimi sentojn oni povas en la nova lingvo. Tra tiuj kelkaj poemoj ili ekkonis eĉ iom de la interna personeco de l' aŭtoro.

Ĝis 1900 kaj eĉ 1903 Esperanto estis ankoraŭ malofte parolata escepte en Ruslando. Ĝi funkciadis antaŭ ĉio skribe. Multaj el ĝiaj plej agemaj propagandistoj aŭ talentaj verkistoj en la okcidento ne kuraĝis paroli la lingvon, ĉar ili neniam havis antaŭan okazon aŭ sperton. Renkontoj inter diversnaciaj esperantistoj estis tiel maloftaj, ke oni citis ilin en la tiamaj gazetoj kiel gravajn aferojn...

(La Esperanto-grupo en Le Havre invitis eksterlandajn esperantistojn 1903 al publikaj kunsidoj.)

(La leginda teksto estas eliro el la verko de E. Privat (1927), kion ni intencas daŭrigi. La libro (200 paĝoj) estas aĉetinda.)

## Esperanto en la Uragano de Ideologioj

### Internacia Esperanto-Simpozio en la Aŭstria Nacia Biblioteko

*La 8-an kaj 9-an de oktobro 2004 la Aŭstria Nacia Biblioteko en kunlaboro kun Universala Esperanto-Asocio organizos simpozion okaze de du l'Esperanto-jubileoj: la centa datreveno de la naskiĝo de Lidia Zamenhof (1904 - 1942) kaj la 75-jariĝo de la Internacia Esperanto-Muzeo (IEM, aligita al la Aŭstria Nacia Biblioteko en 1929).*

.La historio de Esperanto kaj la sorto de esperantistoj estas firme ligita al la ĝenerala historia evoluo. Verki historion de Esperanto signifas verki kadre de la historio de la mondo. Tion montris Ulrich Lins per "La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto". Esperanto do ne estas io ekzotika kaj marĝena, kiel foje opinias la ĝenerala publiko, sed estas integra parto de historiaj evoluoj.

Tiu fakto estas la elirpunktoj de la simpozio, kiu pritraktas la destinon de Esperanto en la politikaj-ideologiaj uraganoj de la pasinta jarcento, fokusante interalie la atenton al la sorto de Lidia Zamenhof (murdita en la koncentrejo Treblinka en 1942) kaj de la Internacia Esperanto-Muzeo (fermita en 1938 fare de la nazioj). Apud tio pritraktiĝos ankaŭ temoj, kiuj tuŝas la nuntempon: Kia estas hodiaŭ la situacio de Esperanto en la mondo? Kiel aspektas la rilato inter Esperanto kaj la nunaj politikaj regantoj? Kiel konduki la esperantistoj en mondo, kiu almenaŭ en la publika diskurso ege malfavoras la ideon de artefarita internacia helplingvo, sed aliflanke pere de modernaj teknologioj ofertas novajn eblecojn?

Laborlingvo dum la unua duontago de la simpozio estos la germana por la ne-Esperanta publiko - la cetera disvolviĝos en Esperanto.

*Paralele okazos: malfermo de ekspozicio pri la sama temo en la Internacia Esperanto-Muzeo, prezento de la noveldonita plena verkaro de Lidia Zamenhof kaj internacia Cseh-kurso por tutkomencantoj.*

*(La germana nomo de la aranĝo estas: Die gefährliche Sprache)*

Partoprenkotizo: 50 €, por studentoj kaj lernantoj 35 €. Aliĝo: [interrete.plansprachenfajonb.ac.at](http://interrete.plansprachenfajonb.ac.at) (kaj) ĉe LEA/G.

Kolekto por Planlingvoj kaj  
la Internacia E.-Muzeo en Vieno, Hofburg  
19.02.04

\*\*\*

Komp.pri ASLE – Aŭstria Socialista Ligo Esperantista, Vieno *estas:*

Reinhold KAMMLER, Karl-Beck-Gasse 3/2, AT-1220 Wien (Kassieradresse)

Kotizo kaj donaco bv. ĝiri al: Konto 241 22 63 PSK (Österreichische Postsparkasse) de ASLE.

-- En la LEA/G-*Informilo estas du paĝoj por la organo de ASLE – LA SOCIALISTO –*

## Esperanto – kurz gefasst

(Daŭrigo)

Das **Zeitwort** erhält in den einfachen Zeiten für alle Personen folgende Endungen:

Gegenwart	-as	mi iras – ich gehe
Vergangenheit	-is	mi iris – ich ging
Zukunft	-os	mi iros – ich werde gehen
Bedingung	-us	mi irus – ich würde gehen
Befehl	-u	iru – geh, geht, gehen Sie!

Die zusammengesetzten Zeiten werden mit dem Hilfszeitwort **esti** – sein und der Tatformendung – anta. –inta, –onta; die Leideform mit der jeweiligen Endung –ata, –ita, –ota gebildet. Das Mittelwort erhält auch die Mehrzahlendung –j.

**Tatform** mi estas irinta – ich bin gegangen  
vi estis irinta – du warst gegangen, sie waren gegangen

li estos irinta – er wird gegangen sein  
ni estus irintaj – wir würden gegangen sein,  
wir wären gegangen

**Leideform** mi estas laŭdata – ich werde gelobt  
vi estis laŭdata – du würdest gelobt usw.

Das **unpersönliche 'es'** wird nicht übersetzt z.B. neĝas – es schneit

**Fragesätze** werden entweder mit einem Fragewort eingeleitet z.B. mit **kio** – was, **kial** – warum, oder sie beginnen mit dem Wort – **ĉu** – ob.  
ĉu la buso haltas? ob der Bus hält? hält der Bus?

Die **Verneinung** **ne** – nicht steht vor dem Zeitwort: mi ne trinkas – ich trinke nicht

(Nächste Lektion in Informilo 7)

### Kie la LEAG- Informilo estas farata!

En Oberkirch!  
Ĝi estas unu de  
la famaj urboj de  
la vinoj en lando  
Baden. Situas  
proksime (30 KM)  
de Strasburgo, kie  
estas la parlamento  
de la Eŭropa Unio.



Oberkirch situas je la Rench-rivero, kiu portas la akvon el la Nigra Arbaro. Ekzistas multaj eblecoj migri en la regiono kaj restadi en belaj restoracioj. Ankaŭ en la proksima Alsaco vi povas ĝui landon, gentojn kaj manĝadojn.

Kiam vi ŝatas ricevi prospekton, A.F. Stephan volontas zorgos, ke la turist-oficejo sendos ĝin al vi.

AFS

## El la redaktejo...

denove kelkaj eraroj en la tekstoj. Dependas ĉu de erara uzo de la komputila klavaro ĉu de la programo mem. Kiel mi jam en la lasta eldono klarigis, la liveranto de mia komputilo opiniis, ke Esperanto estas itala eĉ franca lingvoj, kaj instalas ne nur la eblecon korektigi germanlingvajn tekstojn, sed ankaŭ italajn kaj francajn. Aŭtomate la programo korektigas E-vorton kiu *ŝajnas* itala ekz. kiam mi tajpas –k la programo korektigas en –g. Nun, jes, Hans Rodewig estas tre atentema kontrolanto, nur, li ne ricevis ĉiun tekston de mi, ĉar diversajn mi kopiis de ensendinta materialo, opiniante, ke ne necesigas prezenti ĝin al Hans. – Tre ofte vi, kara leganto, trovas –ŭ en ekz. ankaŭ – ankaŭ. Mi ricevis de la kontrolanto atentigon pri la korekta –ŭ. Dankon! Tiu –ŭ ne plu aperos! – Jam en la lasta eldono mi petis la legantojn, informi min pri eraroj. Du legantoj atentigis min pri tiaj eraroj. Ili, do, tralegis la informilon atente.

Dankon, mi ĝojas, ke la premio plaĉas al vi. Mi ricevis materialon de legantoj, kiuj trovis ĝin en la interreto, kaj faksimiligis ĝin al mi. Bedaŭrinde la tekstoj paliĝitis. Ĉu mi eble ne havas bonan faksan paperon? Mi kontrolos!

Albert Stephan

\*\*\*

## LABOURSTART – retmesaĝoj de sindikatoj

Germanio: Tranĉu pensionojn, prokrastu laboreksiĝon

La 114-jaraĝa pensionsistemo ne plu sukcesas. Konsilantoj de Kanceliero Gerhard Schröder opinias, kela registaro devas malpligrandigi pensiojn je 10%, pligrandigi la aĝon de ekziĝo de 65 al 67 post tri jaroj de ekonomia stagno. Ĉi pensioj englutos trionon de la €-buĝeto pri 248 biliono, kompare kun 12% tra Eŭropo kaj 6% en Usono kaj Japanio. Germanio volas preni pozitivan agadon por fortigi la ekonomion, ankaŭ Germanio volas eviti trian jaran rompon de la EU leĝoj pri deficino je 2004, tio estas malpli ol 3% de la plena nacia produkto.

Germanio devas tranĉi pensionojn pro la pli granda vivekspekto. (*La aĝulo vivas tro longe. La red.*) En 2003 germanoj ricevas pensionon dum dek jaroj kaj pli antaŭ morto. Tio estas salutinda – ĉu ne? La registaro kaj la opozicio postulas, ke laborprenantoj laboru kromajn 2 jarojn, do, ĝis 67 anstataŭ 65 jaraĝo. Ja kelkaj politikistoj preferus malpermesi laboreksiĝon antaŭ aĝo 65 ĝenerale.

*Mi ne komprenas, kiamaniere oni povos prezenti laborplacojn al la junaj homoj, kiam la aĝuloj pli longe laboras?*

(Tajpis AFS)